MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 10

OKTOBRO 2019 Kol. 414/35

xxxx

programeroj povis esti nur piede. Nur la vetero estis preskaŭ la sama en ĉiuj tri kongresoj, la varmo estis super 30 gradoj.
Ĉi tiun landon oni titolas: Lando de miloj da lagoj. Efektive estas tie preskaŭ 200 000 lagoj pli grandaj ol 500 m2.
La ĉefa urbo Helsinki (550 000 loĝantoj) situas tute en la sudo de la finna respubliko kaj Lahti, la nunjara kongresurbo kaj urbo de mondaj ludoj en la j. 1997, estas kun siaj 100 000 loĝantoj la sesa plej granda finna urbo kaj troviĝas proksimume unu horon de busveturo en norda direkto. Ĉie pinarbaroj estas trapenetrataj de multaj biciklovojetoj, kiuj dum la vintro servas por skikurado.

La areoj estas egaj kaj la loĝantaro estas maldensa – la plej malalta saltejo tie samtempe servas kiel baseno por publiko, sur aliaj oni saltas ankaŭ somere sur arta herbo. Tial la kongresa bulteno nomiĝis „La saltejo“. Sur la pontetoj veturas liftoj senpaŭze kaj la muro de tiu plej alta servas kiel muro por montgrimpantoj. Tuj post la pontetoj situas bela pinarbaro kiel en fabeloj.

La finnoj estas bonkoraj kaj amikaj, melankoliaj kaj esprimas sin per pripensoj. Ilia ĉefa malavantaĝo estas por ni tute nekomprenebla lingvo kaj krom la ĉefa urbo kaj trafikaj ligiloj estas tre ĝene interkompreniĝi. La juna generacio grandparte jam feliĉe regas la anglan lingvon. Oni diras, ke la finnoj estas divideblaj je introvertuloj kaj ekstrovertuloj. Kiam introvertulo kun vi parolas, li rigardas la pintojn de siaj ŝuoj. Kiam kun vi parolas ekstrovertulo, li rigardas la pintojn de viaj ŝuoj. En

kadro de kongresa filmo mi vidis horan finnan filmon, kun Esperantaj subtitoloj. Dum la tuta horo tie tradukisto diris ses vortojn.

Kaj kiel aspektas finnaj virinoj? La manko de suna lumo montris, ke ĉefe knabinoj havas blondajn harojn, preskaŭ ĝis blankaj kaj nekredeble blankan haŭton. Kaj la plej tipa imago de la finna viro estas tiu ĉi: motorciklisto kun Harley-Davidson, elrazita kranio kaj ofte rufa liphararo, iam kunigita en harplekton. La motorcikloj bruas tra la stratoj preskaŭ ĝis la 2-a horo nokte, kio al homo la dormon ne faciligas. La junularo, kiu la monon por Harley-Davison ne havas, kreas la grupojn kun malfortaj motorcikloj, ĉe kiuj ili deŝraŭbas la dampilojn, por ke ili aspektu similaj al Harley-motorcikloj almenaŭ per bruo. Praktike ĉiuj homoj veturas tra la urbo bicikle kaj en monteta tereno ĉiuj aspektas kiel bonaj sportistoj, sed preskaŭ neniu biciklo havas transmision kaj kelkaj aspektas, kvazaŭ ili ankoraŭ memorigus la militon. Elektro-biciklojn mi nenie vidis.

En Lahti ni renkontis multajn rusojn, el Rusio estis ankaŭ gvidantino de nia tranoktejo. Ŝi ne tre bone konis la anglan lingvon, do ni devis rememori la rusan lingvon el nia baza lernejo. Sed la tranoktejo estis pura, la viŝtuko estis ŝanĝata ĉiutage, ankaŭ en la kuirejo ni ĉiam trovis ion bongustan. Por 40 eŭroj por unu nokto en unulita ĉambreto la prezo ne estis tro granda.

La kongreso okazis en la halo de la glacihokeo, en kiu normale ludas la loka unua-liga klubo de Pelikanoj. Klubejoj de la stadiono ofte ne sufiĉis por akcepti ĉiujn interesatojn pri unuopaj partoj de la programo, sed la hokejhalo estis por la partoprenantoj de la kongreso (917) sufiĉa. Dum la kongreso okazis kelkaj ekskursoj. Mi partoprenis trarigardon de la urbo Lahti kun komentario de la loka homo kun E-traduko. Mi ankaŭ tre ĝojis pri ekskurso en la loka produktejo de viskio, sed bedaŭrinde pro teknikaj kialoj ni tien ne povis iri. Tamen la prelego pri viskio estis la plej interesa, same kiel prelego pri biero kaj ĝia pozitiva influo por sano.

Dum la kongreso estis fondita ankaŭ organizaĵo de E-amantoj de teo, kiu funkcios enkadre de UEA kaj ĉar en la tempo de la kongreso estas en Lahti lumo preskaŭ la tutan nokton (sunsubiro je la 22,45), la vespera teo-sesio okazis en la parko ĝis noktomezo kun preparo kaj gustumado de japana kaj ĉina teoj. Nur la kuloj likvidis la vesper-kunvenon, ili ja elsvarmis, kiam la suno ekdormis.

La kultura programo estis jam tradicie riĉa, min plej ĉarmis la nederlanda grupo Kajto kaj la serba ĉiosciulo Saša Pilipovič. Merkrede oni okazigis busan ekskurson al Helsinki, sed la prezo pli ol 100 eŭroj ŝajnis al ni tro alta, do nia grupeto partoprenis privatan ekskurson per la trajno. Simile okazis ĉe manĝo kaj trinkado. La biero en la stadiono kostis 6,50 eŭrojn

por kvarono de litro. Pli malmultekostan bieron feliĉe ni malkovris en iu eta gastejo, kie ni ricevis bieron por 3 eŭroj.

Eble jam ĉiu ie legis, ke la estraro de UEA estis parte rekonstituigita kaj ke ne restis „ŝtono sur ŝtono“. La nova prezidanto nun estas Duncan Charters. Mi ne povas taksi la pasintan gvidadon, sed iuj parolis pri malbona stato de financoj.

Mi povas diri, ke la kongreso en Lahti apartenis al la pli malgrandaj kongresoj kaj ĝi estis tre agrabla, sed kvalitojn de Nitra ĝi ne atingis.

Jaroslav Suchánek

E-traduko Jarmila Rýznarová

Universala kongreso en Lahtio

Oficialan raporton pri la Universala kongreso en la finna Lahtio jam skribis mia amiko Jaroslav Suchánek, do mi en tiu ĉi artikoleto mencias nur kelkajn proprajn spertojn kaj rimarkojn. Kompare kun al UK en Lisbono ĉeestis kongreson en Finnlando nur proksimume duono da partoprenantoj.

El Ĉeĥio alflugis bedaŭrinde nur ok personoj. Eble pro tio, ke Finnlando estas relative multekosta lando, eble pro supozata malvarma vetero. Sed en Lahtio estis varme preskaŭ kiel en Lisbono. Mi kiel ĉeĥo estis fiera, ke unu el la salonoj en la kongresejo portis la nomon de eminenta ĉeĥa esperantisto, la antaŭ nelonge forpasinta Josef

Kavka. Ĉar mankis estro de ĈEA, la kongresanojn ĉe la malfermo salutis en la nomo de Ĉeĥio estro de la Ostrava-klubo Jar. Suchánek. Tio ne estis lia premiero, ĉar li jam salutis la kongresanojn en la jaro 1997 en Adelaide, tiam kiel ambasadoro de la Ĉeĥa respubliko en Aŭstralio. Probable en la historio li estas unusola ambasadoro de nia ŝtato, kiu parolas Esperante.

Por mi estis la kongreso tiel same interesa kaj agrabla, kiel la pasintajara kongreso en Lisbono. Ĉar mi ĉiutage laboras kun ĵurnalistoj, mi kompreneble vizitis la kunsidon de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Plej multe mi aprezas la laboron de la lokaj ĵurnalistoj, kiuj eldonis artikolon pri la kongreso kaj Esperanto. Unu paĝon en finna lingvo kaj tuj apude la duan paĝon kun tiu sama enhavo en Esperanto.

Mi dediĉis tempon ne nur al Esperanto, sed ankaŭ al renkontiĝoj kun finnoj en lokaj bierejoj. Kia estis mia surprizo, kiam mi en tute popola bierejo eksciis, ke iuj el la gastoj ne nur scias pri la kongreso, sed unu bier-amanto danke al sia kono de la hispana lingvo provis jam hejme legi la menciitan E-paĝon. Lokaj homoj jam konis E-flagon kaj aprezis diversajn kolorajn E-ĉemizojn. Kvankam mi mem havis kvin ĉemizojn kun Esperanta motivo, al mi plej multe plaĉis la ĉemizo de unu kongresano kun la surskribo „Mi neniam forgesas akuzativo!“(sen „n“)

La travivaĵoj estis belegaj, la renkontiĝoj afablaj, la homoj tre amikemaj, do kion ankoraŭ mencii? Eble dumnokte helan ĉielon kaj bonodorajn arbarojn. Tiuj certe mankos venontjare en Montrealo, sed certe ne mankos la unika bonhumoro de esperantistoj. Jiří Caletka

BET-55 en Litovio - Panevėžys
6.7. - 14.7. 2019

Baltiajn Esperanto-Tagojn akompanis pluv-sun-venta vetero. Ili estas internaciaj aranĝoj kun altnivelaj programeroj kun simila enhavo al la Universalaj Kongresoj. BET-oj okazadas laŭvice en Estonio-Latvio-Litovio. Ĉiutage aperis riĉe ilustrita kvarpaĝa kuriero ABELO, redaktita de Stano Marček. Per ĝi ni estis informitaj pri diversaj okazaĵoj, aperis listo de novaj aliĝintoj, la taga programo kaj manĝmenuo. Li ankaŭ kompilis belan BET-libron kun multaj utilaj sciigoj kaj raportoj de ĉiuj jam okazintaj BET-aranĝoj en Litovio.

Aliĝis 425 esperantistoj el 37 landoj. Tamen kelkaj ne povis alveni pro diversaj kialoj. Laŭ la nombro de partoprenantoj la ĉi-jara BET estas la plej impona lastatempe. La 6-an de julio Litovio festas la Nacian Tagon. Estas kutimo kanti la himnon (nacian Glorkanton) je la 9-a horo vespere ie ajn en la mondo, kie troviĝas litovoj. Do, same okazis dum la BET-55 post la vespera koncerto de Natalia Bertse.

La solena inaŭguro okazis la dimanĉan posttagmezon en la kultura centro de Panevėžys kun la ĉeesto de la urbestro s-ro Rytis Račkauskas. La prezidanto de Litovia Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas bonvenigis ĉiujn partoprenantojn bon-dezirante sukceson al la evento. Biruta Rozenfelde estis iniciatinto de BET-oj antaŭ sesdek jaroj. Post la prezentado de

diversaj salutvortoj, artaj folkloraj grupoj de la urbo prezentis belegan spektaklon de kantoj kaj dancoj. Poste okazis por ĉiuj riĉa urbestra akcepto.

La programo de BET-55 estis varia kaj riĉega. Ne eblas mencii ĉiujn programerojn, ĉar unu paĝo ne sufiĉus. Okazis sinsekvo da prelegoj de Somera Universitato, de SUS-36 (Sanmarineca Universitata Sesio) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), pri kiu eblis aĉeti IKU-libron. Interesaj estis ankaŭ aliaj prelegserioj pri diversaj temoj.

La partoprenantoj povis ekkoni la historion de la litova lingvo kaj ĝian kulturon fare de Aloyzas Gudavičius. Pri spacteleskopoj informis Amri Wandel, pri religio kaj sociologio de Esperanto Walter Żelazny. En prelegserio de Márkus Gábor "Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigas la mondon?" ni provis trovi la respondon. Prelegserio de Orlando Raola temis pri "Media kemio", medioprotektado en la hidrosfero, terkrusto, biosfero.

La prelegciklon pri "Lingvo kaj kulturo" prezentis Ilona Koutny.

Pri la azia movado informis Lee Jungkee, pri la historia E-movado en Ĉinio kaj instruado en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj kaj

pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio donis informojn Gong Xiaofeng (Arko). Amuze kaj serioze pri diversaj karakteroj de Esperanto parolis Aleksandr Melnikov. Baŭhaŭsan artan stilon prezentis Peter Kühnel. Pri "Zamenhofaj objektoj" parolis Robert Kamiński. Li ankaŭ iniciatis kaj instalis interesan ekspozicion de Zeoj. La mondon de fabeloj kaj diversaj herooj prezentis Anna Striganova. Pri la eldonejo Impeto, pri la Reta Revuo de Esperanto, pri modernaj sociaj retoj kaj Esperanto parolis Dima Ŝevĉenko. "Ĉu muziko povas kuraci?" kaj kiamaniere tio okazas, klarigis Pavla Dvořáková. Pri "Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj" informis Manfred Westermayer. Pri gravitaj ondoj parolis Alfred Heiligenbrunner. Intelektajn ludojn prezentis Tatjana Auderskaja. Kanadanoj varbis por la venontjara UK en Montrealo.

Ĉeestantoj spektis la filmon "Litvo – Patrujo mia" de Roman Dobrzyński. Okazis kunveno de ĵurnalistoj kaj aŭtoraj horoj kun Mikaelo Bronŝtejn kaj Tatjana Auderskaja. Estis lanĉita nova eldono de "Baza literatura Krestomatio". Riĉa estis la libroservo, okazis interesaj kvizoj, por Di-kredantoj okazis Meso. Admirinda estis la ekspozicio de pupoj de Anna Striganova. Kortuŝan prezentadon montris sepjaraĝaj infanoj de la urba infanĝardeno "Puriena" laŭ la slovena popola fabelo "Paŝtisteto".

La diversnivelajn Esperanto-kursojn gvidis la jenaj instruistoj: Stano Marĉek el Slovakio, Nina Petuchovska el Pollando,

Abdurachman Junusov el Dagestano, Anne Joussions kaj Françoise Noireau el Francio, Svetlana Smetanina el Rusio, Mikaelo Lineckij el Ukrainio. La proponoj de la esperantista artista programo estis varia kaj tre riĉa. Okazis ĉiutagaj posttagmezaj kaj vesperaj koncertoj. Kun granda sukceso kaj aplaŭdo koncertis por ni la konata litova familia grupo "Sepa kaj Asorti", Kaŝi el Germanio, Amira Chun el Koreio, Jogaile Ĉojute el Litovio, Mikaelo Bronŝtejn el Rusio akompanata de Sergej Straŝnenko (LaTerura) ankaŭ el Rusio, Zuzana Kornicka el Pollando. Violonis Françoise Noireau el Francio. Belsonis ankaŭ kantoj el Ukrainio.

Dum la adiaŭa vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis Esperanto kantojn el Ukrainio, Svislando, Ĉeĥio, Rusio, Pollando, korean dancon, poemon de la knabino Daŝa el Rusio. Ventro-dancadon prezentis litova junulino. Mikaelo Lineckij reĝisoris la programon kaj prezentis la artistojn.

Neforgesebla estis la tuttaga ekskurso al la urbeto *Birzai*, kie ni en kastela muzeo gustumis bieron, ekkonis ĝian fabrikadon kaj ĝuis muzikan prezenton. Poste ni daŭrigis la busvojaĝon al la regiona parko, kie eblis supreniri rigardejon en formo de ŝipo kaj fine en la urbeto *Pakruojis* ni bonguste tagmanĝis kaj promenis en bienpalaca ĝardeno admirante belegajn florkomponaĵojn. La duontaga ekskurso gvidis nin al bieno de aromaj plantoj, kie ni mem pretigis infuzaĵon el ili kaj gustumis lokan mielon kun fromaĝo.
La solena fermo okazis la 13-an de julio. Estis prezentita statistiko pri BET-55, disdonitaj atestiloj al sukcesintaj ekzamenitoj, rozoj al ĉiuj LKK-anoj kaj helpintoj. Koran dankon al litovaj esperantistoj, kiuj multe laboris por la

sukceso de BET-55 kaj al multaj eksterlandaj gastoj, kiuj kontribuis al la aranĝo per diversaj eroj. Liba Gabalda

Tri datrevenoj en Esperanto-klubo en Pardubice

Esperantistoj el Pardubice dimanĉe la 22-an de septembro 2019 rememoris la fondinton de ilia E-klubo, doktoron Stanislav Schulhof.

La memorsolenaĵon sub aŭspicio de la estro de Pardubice-regiono ĉeestis 40 personoj el 15 lokoj el la tuta respubliko. Antaŭtagmeze ni vizitis la tombon de doktoro Schulhof en la juda tombejo, kien ni metis novan memortabulon kaj kelkajn ŝtonetojn laŭ la judaj tradicioj. Ni trarigardis tie ankaŭ ceremoniejon kun judaj memoraĵoj. Reveninte ni metis bukedon sur la tombon de Josef Vaněček, la fondinto de AEH.

En proksima kafejo daŭris la programo per deklamado de poemoj de doktoro Schulhof. La partoprenantoj aŭdis pri lia vivo kaj poste la prelegon de s-ano Petro Chrdle je la temo „Stanislav Schulhof kiel progresema judo“ pri lia ne tro konata agado en la ĉeĥa-juda movado sojle de la 20-a jarcento.

Doktoro Stanislav Schulhof naskiĝis la 12-an de novembro 1864. Do, ni solenis la 155-an datrevenon de lia naskiĝdato kaj 100-an datrevenon de lia forpaso en la jaro 1919. Doktoro

Schulhof estis tre talenta homo, eksterordinare ambicia, kuracisto, filantropo kaj patrioto. Li estis aganta ankaŭ en aliaj fakoj, ekzemple kiel ĵurnalisto, redaktoro, teatro-artisto, verkisto, poeto. En la jaro 1909 li fondis la E-klubon en Pardubice kaj dum dek jaroj estis ĝia prezidanto.

La regiona biblioteko en Pardubice eldonis la dulingvan libreton „MUDr. Stanislav Schulhof, kuracisto, filantropo, elstara esperantisto“. Ĝin kompilis Jarmila Rýznarová, kiu sian preskaŭ tutan vivon dediĉis al Esperanto. La E-klubo eldonis broŝureton al la 110-a datreveno de sia fondo. Ĉiu partoprenanto ricevis ambaŭ libretojn por memoro.

M. Kosnarová kaj L. Angelová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.